# SVISA ESPERANTO - SOCIETO

## INFORMAS

5/92

Koresp-adr: Fritz Liechti Wiesliacher 17 8053 Zürich

Red-Telefono: 01/381 77 13 SEPTEMBRO-OKTOBRO

### ETA HISTORIO DE "AIROLO" EN LA JARCENTOJ

"Airolo" estas tre antikva loko. Supozeble tie loĝis jam siatempe la antaŭromiaj keltoj, sed ĝi rapide latiniĝis, kiel montras la spuroj, kiujn la romiaj legionoj postlasis en vilaĝo apud Airolo, nome en Madrano. Tio almenaŭ signifas tamen, ke la Gotharda montpasejo estis utiligata jam siatempe, malgraŭ la neekzisto de moderna romia strato.

Eklezie apartenanta al Milano, ĝi baldaŭ akiris partan imperian sendependecon en la frua mezepoko. Pli malfrue, parte konkere, parte intence, la Leventinanoj ekapartenis al la kantono URI, ĉefe post la malfermo de la Gotharda pasejo. URI estis disigita de la Uria kantono nur en 1803, okaze de la kreo de la ĝis tiam neekzistinta Tiĉina kantono.

-TC-

## GRUPAJ INFORMOJ

ESPERANTO-SOCIETO BASEL:

24.9. Monata kunveno: Raportoj pri ferioj, kongrespartopreno ktp. Se vi havas fotojn aŭ lumbildojn, bonvolu kunporti ilin.

20.10. Monata kunveno: Recitalo de "Nicolin" en "Centre de l'Eglise Française réformée, Holbeinplatz 7, 20.00h.

ESPERANTO-SOCIETO BERN:
En restoracio al Forno, Spitalgasse 37:
1.9.19.30h kaj 6.10.19.30h.

AIROLO, BONVENON:
La Tiĉina Esperanto-Ligo invitas al marŝ-ekskurso kaj kultura semajnfino, kiu okazos en Leventina valo (en la alp-vilaĝo Airolo, je 1000m super maro). Dato 12-13 septembro 1992.

Programo:
Sabate 12.9.92: Alveno dum la mateno al la komuna hotelo. Komuna sabata tagmanĝo (Fr.20.-). Unua migrado laŭ la alta piedvojo. Se la vetero ne konvenas: unua kultura rondiro al lokaj muzeoj (muzeo de la Gothardaj fortresoj, muzeo de la pasejo St.Gothardo, muzeo de Malalta Leventino (Giornico), preĝejoj de Giornico). Komuna vespermanĝo (Fr.20.-). Vespero komuna kun prezentoj kaj komuna restado.
Dimanĉe 13.9.92:
Eblo viziti Di-Servon (eblas nur katolika). Matena migrado laŭ alta piedvojo, kun tagmeza pikniko (15.-), sed eblas mem pretigi ĝin. Se la tago estas nekonvena: migro al Biaska kaj Bellinzona (historiaj urboj).
Restado, hotelo:
Restado en hotelo Innovacanza 6780 Airolo. la ĉambroj de la hotelo estas ĉu unulitaj kaj unupersonaj, ĉu dupersonaj (2 litoj, aŭ franca lito), kun moderna ekpiĵo.
Kosto Fr.40.- je nokto kaj je persono, inkl. matenmanĝo.
Antaŭmendu tra d-ro Carlevaro, Viale Motta 32,

CH-6500 Bellinzona, kun sendo de antaŭpago (sen kio mendo ne estos konsiderata). Tel:092/25 29 88.

Necesaĵo: Vetero kaj simile.

Evidente neniu povas garantii elstaran veteron, sed eblas transformi turisman programon al kultura programo. Tamen memoru, ke Airolo situas je milmetra alteco kaj tial, vespere, la vetero estas malvarmeta. Tiom pli, se pluv(et)as. Pro tio kunportu taŭgan ekipaĵon, nome: fortikajn ŝuojn, pluvoŝirmajn vestaĵojn, taŭgajn pulovrojn ktp.

(Rigardu ankaŭ la historian tekston pri Airolo).

ESPERANTO-SOCIETO LAUSANNE:

14.9. Prelego de Antoine von Moos. Temo: "Impresoj pri Novzelando"

26./27.9. Kultura Semajnfino en Cully. Temo: "Esperanto kaj Eŭropa Komunumo"

LUCERNA ESPERANTO-SOCIETO:

2.9.14.00-16.00h paroliga kunveno en restoracio Big-Ben Winkelriedstr.39. Gvido Franz Brügger.

3.9.20.00h Ludoj kaj kvizoj. Gvido Fr.Brügger.

24.9.20.00h Literatura vespero kun Sonja Brun.

15.10.20.00h Prelego de Andy Künzli pri: "Interlingvistiko kaj Esperanto en la Cara imperio kaj en Sovetunio"

ESPERANTOKLUBO WIL:

En rest.Schweizerhof Unt.Bahnhofstrasse 18.

2.9.20.00h 77-a UK en Vieno. Rakontos partoprenintoj de la kongreso.

7.10.20.00h Ludvespero kun Leonie Sennhauser.

ESPERANTO-SOCIETO ZUERICH:

14.9.19.00h Libera kunveno en kafejo "Aquarium" Limmatquai 104 Zürich.

29.9.19.00h Paroliga rondo en Aquarium.

12.10.19.00 Monata kunveno en Karl der Grosse.

26.10.19.00 Paroliga rondo en Aquarium.

La Esperantistaj gestudantoj kaj la Esperanto-Junularo Zürich estas invitataj al la ESZ-kunvenoj.

* * *

## VENONTA JES-RENKONTIĜO

De la 25-a ĝis la 27-a de septembro 1992 en

"**KURZENEGG**"

Ĉi-foje ni estas invitataj de Dawid kaj Vera!

PROGRAMO: Ne estas ankoraŭ tute fiksita, sed entenos tutcerte:
- Migrado al Schnebelhorn (1292 m super la maro), plej alta monto en la kantono Zürich.
- Ludoj, klaĉado ktp.

LOKO: Feria domo en Kurzenegg, proksimume 20 km for de Wil. Atingebla nur per aŭto.

ALVENO: Plej bone vendrede la 25-an vespere. Ni renkontiĝos ĉe Dawid kaj Vera hejme kaj veturos kune al la ejo. Se vi ne povas alveni vendrede, bonvolu kontaktiĝi kun Dawid, por trovi alian eblecon.

MANĜO: Ni kuiros mem.

PREZO: Fr. 30.- aŭ Fr. 25.- plus 1 JES-kupono. Tio inkluzivas manĝojn kaj loĝadon.

KONTAKT-ADRESO: Vera kaj Dawid Pochanke
Lettenstrasse 70
9500 Wil (Telefono: 073/22 68 30)

-el la JES-INFORMILO 3/92-

* * *

## KORESPONDPETO

50-jara s-ino ege ŝatus havi korespondant(in)on en Svislando kaj dankas kore jam antaŭe. Skribu al

S-ino Rochelle Jacquier
Ranford Cres 1 Mitchell
PK-5043 Adelaide
Sudaŭstralio

* * *

## OKAZONTAĴOJ EN NIAJ NAJBARAJ LANDOJ GERMANUJO KAJ AŬSTRIO

### G E R M A N I O

5.9. - 12.9.1992: Internacia Esperanto-Kongreso por la pli aĝa generacio, en Kolpinghaus en Augsburg.
Adreso: Waterloostr.21 D-8900 Augsburg.

### A Ù S T R I O:

### INTERNACIA RENKONTIĜO DE LA AŬSTRIA ESPERANTO-JUNULARO

8.10. - 11.10.1992 en la kastelo "Stibichhofen" apud Trofaiach.
Partoprenos multaj gastoj el eksterlando.
Aliĝo: Aŭstria Esperanto-Junularo
poŝtfako 804
A-8011 Graz

### PLILONGIGITA ESPERANTISTA SEMAJNFINO EN GMUEND KAJ VIENO

23.10. - 26.10.1992 vendredo ĝis lundo (nacia festotago).
Vendredo ĝis dimanĉo en Gmünd, kun kursoj, kaj migradoj en la bela Blockheide.

Lundo: posttagmeze ekde la 15.00h okazos seminario dediĉita al literatura temo, en la Esperanto-Muzeo en Vieno.

Niaj kursoj en Gmünd havas jam tradicion. Ĉifoje estas ofertataj kursoj por mezaj progresintoj kaj bone progresintoj.

Aliĝon sendu al:
Esperanto-Muzeo
Hofburg
Michaelerkuppel
A-1010 Wien

* * *

"SCHUBERTIADES" okazos je la 5-a kaj 6-a de septembro 1992 en La Chaux - de - Fonds.

KCE ĝojas gastigi la geaŭskultantojn inter sabato kaj dimanĉo.
Volontuloj anoncu sin ĉe Mireilles Grosjean Temple 20 CH-2416 Les Brenets. Telefono: 039/32 18 88.
La detalan priskribon bonvolu legi en SES-INFORMAS n-ro 3/92 paĝoj 16 kaj 17. -FL-

oooOOooo

## A T E N T I G O

Ni estas petitaj publikigi la jenan informon:

**INVITO AL ESPERANTISTAJ ARTISTOJ KAJ METIISTOJ POR EŬROPA FESTO 1993 EN FRANCIO**

Por pentekosto 1993 la urba turisma asocio en Saint-Lambert-du-Lattay, je 23 km for de Anger, en la bela provinco Anĵu (Francio) planas aranĝi per Esperanto "FESTON PRI EŬROPO" kaj pro tio serĉas tuteŭropajn artistojn kaj metiistojn, kiuj povus, individue aŭ grupe, prezenti ion pri sia lando.

La urba turisma asocio prizorgos la gastigadon. Ebleco de interkonsento pri la vojaĝkostoj. La interesatoj devas sin turni al la Esperantogrupo en "Coteaux-du-Layon, B.P. 5, F-49750 Saint Lambert-du-Lattay, Francio. -André Frangeul-

oooOOooo

## SCIINDAĴO EL LA EKUMENA ESPERANTO-FORUMO

La evangelia komunumo Pfäffingen apud Tübingen (Germanio) okazigis okaze de "LA JARO DE LA BIBLIO" komunajn semajnojn kun la temo: "La biblio estas pli ol libro". Pastro Adolf Burkhardt parolis pri: "LA ESPERANTO-BIBLIO EN LA MONDO, LA INTERNACIA LINGVO EN LA SERVO DE LA EVANGELIO", apogante sin al longjaraj spertoj en multaj landoj. Ĉe la granda nombro da bibliotradukoj al ĉiu ajn lingvo, oni povus kontraŭargumenti, ke la Esperanto-Biblio estus superflua, sed depost kristanoj renkontiĝas sur la ponto de la Esperanto-Lingvo, ili deziris nenion pli urĝan ol posedi propran biblion. --komunaj bibliolaboroj en kunvenoj, Di-servoj okaze de kongresoj kaj konferencoj, gazetartikoloj kun bibliaj citaĵoj-- ĉio tio estus apenaŭ pensebla, se ĉiu,ĉiufoje, plutradukus el la propra traduko. Tial la Esperanto-Biblio estas dekomence prilaborita el la prateksto, la malnova testamento de la aŭtoro de Esperanto mem, la nova testamento de laborgrupo de anglaj teologoj. -trad. FL-

* * *

## LINGVA SPERTO DE JUNULINO

Regina Burkhardt partoprenis la ekumenan junularan renkontiĝon en Barcelona. Pri tio ŝi skribis jene:

Miaj spertoj koincidas kun tiuj, kiuj aperis en la komunuma informilo. Min ĝenis la konfuzo de la diversaj lingvoj en la grandaj okazigoj, kiu, ankaŭ ĉe ampleksaj lingvoscioj, preskaŭ malebligis la komprenadon.

Kial ni kristanoj ne utiligas la solvon, kiun prezentas Esperanto?

Mi mem jam plurfoje spertis, ke homoj el pli ol kvindek nacioj (en Barcelona ni estis iom pli ol dekduo) egalrajte kaj tute klare interkompreniĝis pere de Esperanto. -el EEF trad. FL-

* * *

## EN LA UNUA DUONO DE LA JARO 1992 SES RICEVIS LA JENAJN DONACOJN

W. Schaufelberger 10.-, W. Rieser 10.-, A. Veith 20.-, G.Gacond 10.-, A. Kessler 20.-, D. Lambercy 20.-, R. Schneebeli 20.-, E. Glättli 10.-, L. Roth 30.- R.van Puijenbroek 10.-, G. Gamper 20.-, H. Renard 20.-, M. Sormani 20.-, S.Piotrowska 50.-, A. Cattin 20.-, P. Dorthe 20.-, L.Dovat 10.-, L. Schaerer 50.-, G. Merz 40.-, Chr.Sixtus-Pot 100.-, M. Erbetta 70.-, W. Gasser 50.-, W. Laederach 30.-, P. Vasserot 5.-

La Centra Komitato de SES tutkore dankas por tiuj valoraj kontribuoj.

* * *

## MI PETAS PRI VIA ATENTO

Mi ĝojas anonci al vi, ke krom por Heroldo de Esperanto kaj Monato, mi estas ekde nun ankaŭ peranto en Svislando por:
-El Popola Ĉinio (jarabono 39.50) kaj por
-Evento- kaj -La Norda Prismo-.
Evento (jarabono 40.-) estas movada gazeto, kiu aperas dusemajne. La eldonejo estas la Lingvo-Studio en Budapeŝto, fare de Szilvasi Laszlo. La Norda Prismo estas kvaronjara literatura revuo, kies eldonisto estas Lasse Kivistoe en Finnlando.

Turnu vin aŭ pagu al:
CH. Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen.
Poŝtĉekkonto 40-52612-7. Dankon pro via atento.

* * *

Redaktfino por SES INFORMAS 6/92 estas la 17-a de oktobro 1992.